

# La SAGO

La Sat-Amikara GazetO



**Espéranto :**  
*vers une culture sociale sans frontières.*

*Pri la kongres,  
atente legu la  
centrajn paĝojn,  
je l' vanaj dioj (\*)!*



(\*)Beria (sed ne nur) esprimo, kies ĉefa varianto estas : «Je l' dudek dioj!

**Kongreso p. 7-10**



*La plej oportuna  
donaco, kroĉenda  
en julo-arbo !*

*Aĥ ! Jam troviĝas konkurenco...*

*Ja tute endas por vi...Sed kion vi planas por mi ?*

*Eble baldaŭan albumon «ĉe la lago»*



**LibroServo p.12-13**

# Legindaj Legendoj

## Hanumano portas monton.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

Ravano estis la reĝo de la Insulo Sri-Lanko. Virin-ŝatanto<sup>1</sup>, li iam forrabis<sup>2</sup> la edzinon Sita<sup>3</sup> de la ĉef-dio Ramo, kiel vi ja scias. Ramo helpata de sia frato Lakŝamo deklaris militon kontraŭ Ravano por repreni la amatinon. En terura batalo, baldaŭ Lakŝamo estis grave vundita. Ramo sendis Hanumanon en la montaron Himalajo<sup>3</sup> por trovi la medicinan herbon kapablan kuraci Lakŝamon. Ravano kredis, ne sen prudento, ke se Lakŝamo mortos, Ramo rezignos la militon pro la granda ĉagreno. Li do sendis la sorĉiston Kalanemo<sup>3</sup> por kapti Hanumanon kaj malhelpi lin en lia herb-serĉado. Sed sin defendante, Hanumano mortigis Kalanemon. Eksciinte<sup>4</sup> tiun morton, Ravano tuj alvokis Surjan, la sun-dion<sup>5</sup>, kaj ordonis, ke li leviĝu antaŭ la planita tempo, ĉar la kuracisto Suŝeno informis lin, ke Lakŝamo mortos antaŭ la fino de la venonta tago. La tago devis tuj komenci por fini plej frue. Kompreninte la danĝeron, Hanumano multoble<sup>6</sup> pligrandigis sian korpon kaj malhelpis la vojaĝon de la suno por reteni ĝin, ke ĝi ne malleviĝu, daŭrigante la tagan tempon.

Tiam, li plu serĉis la kuracan herbon. Kiel? Ne gravas. Forgesu la detalojn. Li baldaŭ konsciis, ke li ne kapablas identigi la bonan planton. Oni povas esti dia fortikulo<sup>7</sup> kaj ne herbisto. Al ĉiu sia fako. Ankaŭ Hanumano ne embarasiĝis pro detaloj. Li prenis la tutan montaron kaj portis ĝin sur la batakampon en Sri-Lanko. Lakŝamo

estis savita dank' al tiu diligenta iniciato. Ramo, plej kontenta kaj dankema, tiam deklaris Hanumanon tiel kara, kiel propra frato.

Hanumano nun ellasis la Sunon kaj petis de ĝi pardonon pro la ĝeno, ĉar vi memoras, Surja, la sun-dio<sup>5</sup>, estis la iama kaj respektata guro de Hanumano en lia infanaĝo.

**Klod**

Notoj:

1	Virin-ŝatanto: viro, kiu ŝatas la virinojn.
2	Forrabis: prenis por si kaj portis malproksimen la edzinon.
3	Tiu vorto, «identiga priskribo» de la antaŭa, ne postulas la akuzativon de la priskribita.
4	Post kiam li eksciis.
5	Tiu esprimo inter komoj, estas «apudmeto» de la antaŭa vorto, kaj devas simili al ĝi laŭ akuzativigo.
6	Multoble. Hanumano pligrandigis la volumenon de sia korpo multajn fojojn.
7	Fortikulo = ulo fortika



# E-kuiru!

## Ĉokolad-avelkuko



Por 6 personoj:

200 g da faruno  
40 g da maiza fekulo  
130 g da rufa sukero  
1 saketo da vanila sukero  
1 saketo da kemia gisto  
100 g da fandita ĉokolado  
50 g da ĉokoladaj pecetoj  
120 ml da oleo  
120 ml da vegetala lakto  
120 g da pomkompoto  
50 g da avela pulvoro

En salatujo miksu kune farunon, fekulon, giston, sukeron kaj avelpulvoron.

En alia salatujo fandu la ĉokoladon en oleo. Kaj aldonu poste la kompton kaj la lakton.

Verŝu la duan miksaĵon (likvan) en la unuan salatujojn kaj ĉion miksu.

Aldonu la ĉokoladajn pecetojn.

Kuiru dum 45 minutoj je 180 °C.

**Flora Markov**

Tutcerte, vi sukcesis elturniĝi kun la du «suplementoj» de LS79, kiuj erare prezentiĝis kiel kroma duobla paĝo, vinkita interne de la revuo. Tute prave, vi ne nur ĝin eltiris de la revuo, sed plie tondis en du apartaj folioj, kiujn vi aparte traktis.

Tamen kreu ke ni ne faris tion por testi vian elturniĝemon, pri kiu, ni ne havas dubojn.

**NDLR**

## Paŭlo Lafont forlasis nin

la dekunuan de julio<sup>(1)</sup>. Abrupte, (li ne estis malsana), li lasis grandan truon en sia familio kaj en la grupo Espéranto-Limousin.

Li estis ĵonglisto de frazoj, de vortoj, vortoj en la franca, en la okcitana kaj en la esperanta.

Ekde 1991, li komencis verki sian taglibron en la internacia lingvo kaj nigriĝis per esperantaj frazoj multajn kajerojn kaj kiam nia kolektiva memoro paneis, interalie por rakonti esperantajn komunajn travivaĵojn en nia loka gazeto «Babilemo sen limoj», ni petis de Paŭlo ĉerpi el sia taglibro la tagparton kiun ni deziris eldoni.

Paŭlo komencis lerni esperanton kiam li estis dudektrijaraĝa per la korespondaj kursoj de **Pierre Delaire**. Por li Esperanto estis unu el la elementoj de interpopola frateco kiun li tiel sopiris.

Paŭlo ni ne forgesos vin.

Lia lasta kongreso, tiu de Sète, estis por li mirinda travivaĵo.

**Isabelle Jacob**

(1) Anoncite en LS78 sed ni tiam ne ricevis la tekston.



## El la SAT-movado Reago de SATano.

*Tiu reago al la artikolo de Robin (LS79) «kunfandu ni la diversajn SAT-movadajn revuojn», kiu ne aperis oficiale en Sennaciulo, sed nur en ret-forumo de SAT, kvankam ĉefe formala, ja utilas, kaj certe utilos por la labor-grupo pri La Sago en la onta kongreso, por ne devoĵigi en ne aplikeblaj proponoj.*

### Pri eventuala kunfandiĝo de SAT-movadaj gazetoj.

Ne nur nenio malhelpas, sed ĉio invitas al kiel eble plej intima kunlaboro, en la respekto je la memstareco de la koncernataj asocioj, inter SAT kaj la LEA-oj.

Statuto de SAT, 1.ĉ: «servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT.»

«15. La Ĝ.K.-aro konsistas el... Ĉ) unu reprezentanto de ĉiu LEA konvencie ligita kun SAT...»

Gotenbarga Konvencio: «1. Konsiderante, ke la nacilingvaj esperanto-asocioj kvazaŭ formas la rezervujon por la tutmonda esperanto-asocio (SAT), ĉiu laborista esperantisto klopodu, ke la interrilatoj estu la plej intimaj inter ambaŭ organizoj.» Ktp.

La ĉefa ligilo inter la LEA-oj kaj SAT estas iliaj principe komuna membraro kaj analogaj celoj. La ekzisto da instancoj kaj organoj (ĜK-aro, LEA-grupoj, SAT-rondoj ...) ne celas korseti tiun horizontalan interrilatadon, sed provizi ĝin per asociaj rimedoj.

Pri redaktado de la SAT-gazetoj (Sennaciulo, Sennacieca Revuo), la PK rekte estas decidpova kaj respondeca antaŭ la Kongreso. La redakta komitato ne havas statutan ekziston, sed funkcias sub la respondeco de la PK, antaŭ kiu ĝi mem respondecas. Sekve la propono de Robin koncerne SAT estas rekte turnita al la PK, kiu rajtas konsulti kiun ajn ĝi volas,

notinde la redaktan komitaton kaj la tutan membraron, sed devos mem lastinstance decidi por SAT.

Ĉiu LEA decidos por si laŭ siaj propraj statutaj proceduroj. Al iliaj reprezentantoj en la ĜK-aro apartenas la tasko konsulti sian komitaton kaj peri la respondon. La LEA-Komitato, laŭmezure kiel ĝi funkcias, estas koncernata, precipe, se eblos, por kunordigi la decidojn. En praktiko, kiam mankas iu el la formalaj organoj, ĉiu aktivulo en sia sfero rajtas interveni kun plena SAT-anea respondeco por funkciigi la aferon. Ankaŭ ne necesas, ke ĉiuj koncernataj LEA-oj decidu partopreni, ekde kiam la PK kaj almenaŭ unu LEA estos pretaj por eksperimenti la proponon. Aliaj povos aliĝi pli malfrue, se ili volos, laŭmezure kiel ili pretiĝos. Cetere nepre estas klarvorta kaj praktika agnosko, por ĉiu partoprenanta asocio, je nerezignebla rajto facile retiriĝi.

Kun la konsento de PK povas okazi debato inter ĉiuj koncernatoj pri la propono, kaj ĝia detala ekzameno. Ne necesas sekvi la formalan proceduron de propono al la Kongreso kaj referendumo, ĉar kunfando de SAT-movadaj asociaj rimedoj ne estas kunfando de malsamcelaj asocioj.

Ĉi tia propono por SAT estus devige submetota al la rigore formala proceduro por ekzameno je principaj proponoj, kun statuta devo de la PK eventuale rifuzi ĝian publikigon por eviti tede vanan debaton. Apenaŭ utilas rediri, ke al PK

SAT-Amikaro Kongreso	1,7/10
<b>El la SAT movado</b> Reago de SATano	3
<b>Analizoj/opinioj</b> Scienco sen konscienco Pri komunikado, instruado, lernado	4/5 5
<b>Lingvo</b> Legindaj legendoj Kiel Esp-igi proprajn nomojn -15-	2 13
<b>Libro-servo</b>	12
<b>Recenzoj</b> Libro vivas pli longe ol unu sezono	11
<b>Diversaĵoj:</b> E-kuiru. E-o en kongreso de la Libera Penso Laŭdacio por Claude Gacond	2 6 14
<b>Humuraĵoj-humoraĵoj</b> HuMorelaj Linioj Selle-humuraĵoj BD: Ĉe la lago	6 4,6,11 16
<b>Plu moviĝas la Movado - Le</b> <b>Mouvement en mouvement</b> Pola retejo, AGJA Bordeaux, Fantomas Greziljono, Konkurso de infan-desegnoj, Mediteranea Eo-semajno. Cours à Nilvange. Karmen' en Bureso.	15 16

apartenas la decido konsulti kaj informi la membraron, kiam ĝi juĝos la projekton matura kaj laŭ la maniero, kiun ĝi juĝos konvena. Pri redaktado de la oficiala organo de SAT, la PK ne povas cedi siajn interligitajn lastinstancajn decidpovon kaj respondecon.

Mi kutime provas rekte kaj klare esprimi mian opinion, sed ĝi ne estas dogmo: ĝin povas modifi debato en kiu ĝi nur estas nenio pli ol unu kontribuo inter aliaj.

Petro Levi (SAT 23111).

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

**Ĉefredaktanto** : Vito Markovo. **Enpaĝiganto** : Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo** : Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de** : Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos.

**Partoprenis en ĉi numero** : Andreo Andrio, Henriko Graven, Mireille Grosjean, Reinhard Haupenthal, Isabelle Jacob, Klod, Ĵak Le Puil, Petro Levi, Flora Markov, Vito Markovo, Lin' Morel, Loĉ kaj Annie Roussain, Jean Selle, Serĝo Sir', Juliette Ternant.

### Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

**Serge Sire** (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : [lasago@free.fr](mailto:lasago@free.fr)

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku margene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*

**Pri la enhavo de la artikoloj  
respondecas la aŭtoroj mem.**

**Represo de artikoloj permesata  
kun indiko de la fonto**

# Karmen' : Ni aŭskultis, ni kantis, kaj certe ni venkos !



Sur la placo de trankvila vilaĝo (Bureso), ĉiu-matene kaj senkompate eldormiĝ-intaj, dum tri tagoj, de la kanto de la virkoko, post la tintintaj sonoriloj, multaj belaj cigaristinoj al kanti pretiĝas ... kaj kluki en plenplena manĝo-ĉambro de kvinpetalo.

Majstra ĥorestrino, nure esperantista, ŝajne !

Rigora kaj imagemega enscenigistino, efika ankaŭ ŝi !

Militista Infanaro : adorindaj, saĝaj kiel bildoj, lertaj de fulmrapida progreso ...

Sekvonta kunveno : en Greziljono, kaj en aliaj regionoj ... Atentu al vi, virinoj : La tenoroj « tintsonorilos » !

Sed ... Ŝŝ ! Oni ne povas plu detali, por ne

fuŝi vian plezuron veni ... nin aplaŭdi !

Ne maltrafu la unuajn spektaklojn printempe 2013. Momente 50 gekorusanoj aliĝis la projekton, al tio ni aldonu muzikistojn, dancistojn, solistojn. Ĉu ni trovos sufiĉe grandan scenejon ?

Loĉ kaj Annie Roussain

Panjo ! Mi diskutis kun mia fratino, kaj ŝi diris, ke edziniĝe...

...vi konsilis al ŝi, serĉi viron plej elmontreman...

...kaj ke plie ŝi provu plej kokete allogi lin...

..ĝuste la malon de tio, kion vi priskribis al mi kiel taŭgan modelon de edziniĝebla virino ...

Evidente, filo mia ! Edziĝe, strategio de viro ne estas strategio de virino !

Kaj reciproke !

La Tri-buloj 5

Panjo ! Ĉu mi komprenu, ke por vi viroj kaj virinoj ne egalas ?

Ĉu vi kreteniĝis ?

Viro kaj virino estas ece kaj videble malsamaj !

Nu, trankviligu min...

Vi ne iĝis samseksemulo, ĉu ?

Mi kredis bela idealo, egalecon de la seksoj !

Kiel du «malsamaj» aferoj povas esti «egalaj» ?

